

# KONTAKTO

numero 144 (1994:6)

**Pluraj  
lingvoj sur  
la lango**

- La Granda TrajnVojaĝo
- En la lando de Julavo
- La rajto je la parolo
- Piron rakontas pri la forto de la rigardo
- Du konkursoj en tiu ĉi numero!

# La Granda Tra

La Granda TrajnVojaĝo	Lena, Rusio kaj Klaas, Nederlando	2
Pluraj lingvoj sur la langoj	Zdravka Metz, Kanado	4
Krucvorto (konkurso)	Ilkka Santtila, Finnlando	7
La bona ingo		7
Kiu kredas je la Julavo?	Abdullah Mossah, Germanio	8
Kaŝitaj vortoj (konkurso)	Claus Günkel, Germanio	9
La angulo de Ludmila kaj Petro	Ludmila kaj Piotr Maliccy, Pollando	10
Rajto je la parolo	May Bijleveld, Brazilo	10
Tatara tendo	trad. Sabira Ståhlberg, Germanio	11
Kiu povas...	Claude Piron, Svisio	12
Manĝu trinku viro ino	Sabira Ståhlberg, Germanio	14
La kliento	Irina Alekseeva, Rusio	14
Tentaklo		15
La saĝa viro	Ọshọ-Davies Olúwábùnmi, Niĝerio	15
Lidja	Heinz Dieter Maas, Germanio	16

## KONTAKTO

Dumonata socikultura gazeto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), eldonata de Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Fondita en 1963

N-ro 144 (1994:6), 31a jarkolekto

ISSN 0023-3692

Legata en 90 landoj (voĉlegata por blinduloj)

Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176  
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando;  
☎ +31 10 436 10 44;  
☉ fakso +31 10 436 17 51  
e-poŝto: uea@wammes.erc.eur.nl

Redaktoro: Francisco L. Veuthy

Konstantaj kunlaborantoj:

Irina Alekseeva (Rusio)  
Felip Artero i Lozano (Katalunio)  
Martin Burkert (Germanio)  
Zoran Ćirić (Serbio)  
Alberto García Fumero (Kubo)  
Bernard Golden (Hungario)  
Claus Günkel (Germanio)  
Georgo Kamaĉo (Hispanio)  
Ludmila kaj Piotr Maliccy (Pollando)  
Remigiusz Mielcarek (Kanado)  
Atilio Orellana Rojas (Argentino)  
Ọshọ-Davies Olúwábùnmi (Niĝerio)  
Claude Piron (Svislando)  
Cláudio Rodrigues Pistilli (Brazilo)  
Jozef Truong (Usono)  
Ilkka Santtila (Finnlando)  
Sabira Ståhlberg (Germanio)

Grafika elpretigo: Roy McCoy


Provlegado: Rob Moerbeeck

Presado: Grafisch Bedrijf Tuijtel

Facilingvaj artikoloj estas verkitaj en la niveloj tre *facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de KONTAKTO. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujare.

Anonctarifo:

Tutpaĝa 675 gld., duonpaĝa 375 gld., kvaronpaĝa 205 gld., sesonpaĝa 155 gld., okonpaĝa 110 gld. Eksterkovrilaj anoncoj kostas duoble. Senŝanĝe ripetita anonco (ne anonceto!) en sinsekvaj numeroj rajtas je rabato de 20%. Por movadaj instancoj: 50% rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30% el la prezo de la koncerna anonco. La abontarifo varias laŭlande. Petu informojn de la supra adreso.



## enkonduko

Ĉu vi faras ion ekster via kutima studado aŭ laboro, aktivante por io, kion oni ne pagas al vi? Kial vi faras tion volonte? Kio logas vin al tio? Kiu estas via premio? Verku pri tio (maksimume 500 vortojn kaj prefere ne pri via Esperanta okupo) kaj sendu al KONTAKTO, ĉar ĝuste "Aktivismo: Junularo, kiu ne nur dancas" estas la temo de la venonta IJK.

Survoje al Sankt-Peterburgo en Rusio, certe multaj el ni baltos en Finnlando por la UK en Tampere. Estas bona okazo por alproksimiĝi ankaŭ al tiu ĉi lando. Ekde la venonta numero vi iom konatiĝos kun iu tre aparta humuro: la "babilajoj" de Olli (tre fama humoristo finna), kiuj venos en traduko de Ilkka Santtila. Do, Rusio kaj Finnlando aparte elstaru en niaj venontaj numeroj: atentu por sendi viajn kontribuajojn! Cetere, mi aparte ŝatus aperigi pri la Mumin-mondo kaj Tove Janson. Ĉu iu spertulo pretas?

Por kontentigi ŝatantojn de facilaj sed ankaŭ de malfacilaj enigmoj, okaze de la jarfino ni donacas al vi du konkursojn. La ĉefan donacon tamen faru mem al vi: reabonon de KONTAKTO por 1995!

*Francisco*

*Eble vi jam aŭdis, ke trideko da gejunuloj, plejparte okcident-eŭropanoj, iris trajne\* el Moskvo ĝis Ch'ōnan, Koreio, por partopreni la Internacian Junularan Kongreson — IJK. Tiun neforgeseblan sperton oni ĵus kaptis en verko, kiu laste aperis: La Granda Fotlibro de la Granda TrajnVojaĝo.*

Lena Lebedeva el Rusio, TEJO-estraranino, kunorganizanto kaj mem partoprenanto de la Granda TrajnVojaĝo, rakontis al KONTAKTO, ke la ideo pri tiu trans-Siberia vojaĝego naskiĝis jam en la Montreala IJK, en 1992. Dum la Vraca IJK en 1993 oni revenis al ĝi kaj de tiam la preparoj ne plu interrompiĝis. Lena mem malkaŝas, ke ŝi ne kredis, ke okcidentanoj pretos akcepti tiel malfacilan vojaĝegon, tiel longan kaj sub aliaj apartaĵoj ol estas ĉe ili.

En Moskvo, kie la vojaĝo devis komenciĝi, la vojaĝantoj tranoktis ĉe rusaj esperantistoj, kiuj eĉ kun tiel malfacila vivo nuntempa ne forgesis sian amon al vizitantoj. Kelkajn tagojn poste, la 11-an de julio 1994, ĉiuj tridek partoprenantoj, inter kiuj nur du plen-aĝaj, jam pretis ekiri. Sed mankis ankoraŭ eta bezonaĵo: la vojaĝ-biletoj\*, kiujn eĉ post multaj provoj oni ne sukcesis havigi al si antaŭe. Krome la vojaĝ-oficejo, kiu prizorgis la biletojn de Krasnojarsk ĝis Pekino telefonis unu semajnon antaŭe por diri, ke ili ne sukcesas aĉeti la biletojn kaj redonis tiun parton de la mono. Ankaŭ la ŝipa vojaĝ-oficejo telefonis por diri, ke ilian ŝipon aĉetis alia komercejo. Do la tuton estis tre malfacile organizi, kaj al kelkaj, kiel al kunorganizanto Jan van der Vliet el Nederlando, tio kostis sendormajn noktojn.

En Krasnojarsk la feliĉa vojaĝantaro partoprenis 4 tagojn en OrSEJT (Orienta Somera Esperanto-Junulara Tendaro), dum kiu la geknabaro konis regionon Stolby per piediro de 19 kilometroj\*, purigis sin en lago, manĝis meze de la naturo kaj iris per ŝipo laŭ la rivero Birjusa. Poste ili de-nove entrainiĝis por Pekino, kie ili restis plenan semajnon sub la zorgo de ĉinaj sam-ide-anoj kaj EL POPOLA ĈINIO akceptis ilin. De tie ili iris ĝis Weihai por preni ŝipon ĝis Inch'ōn en Koreio. Sekvis vojaĝo al Seulo kaj fin-fine... Ch'ōnan, la urbo de la 50-a IJK.

*Supre: Lena manĝas en la vagono, meze de du aliaj TrajnVojaĝ-anoj. Apude: Siberia vidaĵo el la fenestro.*



Ne miru do, ke oni venis al la ideo, ke tiel multaj kaj diversaj tra-vivaĵoj kaj sentoj estas indaj je libro. Ĝuste tial la 30-kapa grupo pretigis foto-libron, kiu en-havas iom pli ol fotojn... Fakte, la tuta libro estas plena de travivaĵoj kaj priskriboj. En ĝi vi legos, ekzemple, kiel malfacile estas sendi ion per-poŝte el Ĉinio aŭ kion junulo faras, kiam tuta uj-ego da varmega supo\* falas sur lin.

La ideo pri libro naskiĝis jam sur-trajne, ie ĉe Uraloj, kiam iu metis informan skribaĵon sur la trajnan muron por sciigi la aliajn pri la ebleco. Kiam la vojaĝo finiĝis, unu el la partoprenantoj dissendis grandan demandaron kun proksimume 40 demandoj, kiun ĉiuj partoprenantoj ĝusta-tempe redonis. La kolektanto de la tuto ricevis ĉion kaj sukcesis kunigi entute pli ol 7 000 fotojn, plus plurhorajn filmo-pecojn (do ne malkredu, se baldaŭ ekestos ia *La Filmo de la Granda...*).

Sekvis labor-tagoj en Essen, Germanio, dum la renkontiĝo Klafoklaĉo (Essen, Germanio, 7-9 oktobro) kaj du semajnojn poste alia en Deventer, Nederlando, kie plejparto el la trajn-vojaĝanoj (kelkaj ankoraŭ ne revenis!) elektis fotojn kaj skribaĵojn, vidis la filmojn, metis la bildojn sur la paĝojn kaj memoris la belajn travivaĵojn de la vojaĝo.

Kiuj interesiĝas havi la libron (kun veraj fotoj sur la 74 paĝoj) rajtas ricevi ĝin kontraŭ 40 gld. de la librofariŝto:

**bileto:** paper-folieta, kiu rajtigas la havanton je io

**kilometro:** 1 000 metroj (= unuo de longo en la internacia metra sistemo)

**trajno:** vagonaro

**supo:** akva manĝaĵo

Klaas Dijkstra,  
Jan Luykenlaan 102,  
NL-7412 NS Deventer,  
Nederlando.

*Buŝe raportis: Lena Lebedeva, Rusio  
Bele fotis: Klaas Dijkstra, Nederlando*

## BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 1995

UEA denove invitas verkemulojn en la arenon de la Belartaj Konkursoj, lanĉitaj en 1950 laŭ iniciato de la ĵus forpasinta Reto Rossetti. Jam centoj da esperantistoj provis sian talenton en tiuj ĉi olimpikoj de la Esperanta kulturo, en kies premiolistoj la publiko unuafoje renkontis nomojn kiuj nun difinas la Esperantan literaturon de la lastaj jardekoj.

En la longa historio de la Belartaj Konkursoj la jaro 1994 apartenis al la malpli fekundaj. Tiom pli forta do estas la ĉi-foja invito por provi konkuri la premiojn kiujn oni aljuĝos dum la UK en Tampere.

Ĉiuj konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, ne publikigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

**Poezio:** Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

**Prozo:** Maksimuma longo 200 x 65 tajpospacoj. Tri premioj.

**Teatraĵo:** Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

**Eseo:** Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la 80-a UK: “Ni, la popoloj” – unu mondo aŭ disaj eroj”. Premio “Luigi Minnaja”.

**Kanto:** Teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio “An-okin”.

**Vidbendo:** Temo prefere ligita kun Esperanto. Maksimuma daŭro 30 minutoj. Sistema VHS/PAL. Tri premioj.

**Infanlibro de la Jaro:** Originala aŭ tradukita libro, presforme aperinta en 1994. Unu premio.

**Sendo:** Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 1995. Por vidbendo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 1995. Ĉion oni adresu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

La konkursaĵoj (krom vidbendoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj adreso estu en aparta koverto. Se eble, oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo en kiu oni konkuras.

**Premioj:** Unua premio: 390 gld. Dua premio: 273 gld. Tria premio: 156 gld. Luigi Minnaja kaj An-okin: 390 gld. Nova Talento (por la plej bona konkursanto antaŭe ne premiita): 273 gld. Infanlibro: 819 gld.

**Publikigo:** La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperi ilin senpage en antologio de la Konkursoj.

**Detala regularo** haveblas kontraŭ unu respondkupono.

**P**or mi internacia familio estas realo. Tiu realon mi vivas jam de dek tri jaroj, dek du el ili en la lando de mia edzo. Tiu bollandon mi akcentas ĉar tuj de la komenco ni havis ekonomian kaj psikologian subtenon de mia bofamilio. Tio helpis al mi travivi pli milde la kulturajn ŝokon kaj ekde la alveno, kiel enmigrinto, mi sentis min akceptita.

Valoras menci, ke la unuajn ses monatojn mi entute ne komprenis aŭ parolis la francan, tiel ke Esperanto estis mia sola komunikilo, danke al interpretado de mia edzo. Pri tiu vivo kiel lingva handikapulo mi povus longe rakonti. Sed nun gravas diri, ke de kiam mi komencis lerni la francan, ni venis vivi en Montrealo. Ĝi estas ne nur internacia urbo, sed ankaŭ urbo malfermita al ĉiuj kulturoj. Tiu fenomeno de multkultureco estas videbla ĉie.

Trairante la stratojn oni rimarkas vendejojn, restoraciojn, lernejojn, kvartalojn: italajn, grekajn, judajn, arabajn kaj aliajn. Ene de publikaj transportiloj oni aŭdas lingvojn plej diversajn; same oni vidas tipajn vestaĵojn aŭ aliajn simbolojn de identeco.

En Montrealo, kiel en amika urbo, ĉiu sentas sin bonvena. En tiu ĉi kvazaŭ-Babilono, sed pli harmonia ol tiu de la rakonto, mi kuraĝas kaj ŝatas paroli lingvon kun familianoj aŭ geamiko laŭplaĉe kaj laŭ la situacio: france, Esperante aŭ kroate. Oficialaj lingvoj estas la franca kaj angla, depende de la kvartalo.

Kiam ni decidis instrui paroli plurajn lingvojn al niaj infanoj? Kiel ni sukcesis efektiviĝi tion? Ĉu estis malfacilaĵoj sur tiu vojo? Ĉu ni renkontis problemojn kaj foje bedaŭris pri trilingveco endome? Pri tio mi ja ŝatus rakonti al vi.

### Ne okazis kiel en la poemo

Mi estas esperantistino, kiu komencis lerni la internacian lingvon kiel simplan mezlernejan fakon. Tamen mi estis bonŝanca, ĉar iom mia patro kaj iom mia instruistino stimulis min rakontante proprajn spertojn pri Esperanto kaj la mondo. Ĝuste Graz estis la urbo, kie en 1970 okazis IJK\* kaj en kiu mi mem spertis tiun internacian etoson kaj valoron de Esperanto. Graz estas la urbo de mia verdiĝo kaj mi estas feliĉa denove esti ĉi tie. Miaj impresoj pri Esperanto kiel lingvo por internacia komunikado tiom entuziasmigis min, ke eĉ hodiaŭ mi vivas kun simila admiro pri tiu lingvo.

Dek jarojn poste, dum la IJK en Finnlando, mi renkontis kebekianon. Kun li, eĉ post la kongreso, mi daŭrigis la komunikadon uzante nur Esperanton malgraŭ tio, ke li konis tri kaj mi du aliajn lingvojn — sed ne samajn. Ni geedziĝis sed ne okazis laŭ la fama poemo “edzino... fino!”. Male, ni kvazaŭ duobligis la entuziasmon kaj energion por Esperanto. Esperanto fariĝis nia lingvo, familia lingvo, unue en Kroatio kaj poste en Kebekio.

Kiam ni atendis la unuan bebon, kun pli da intereso ni informiĝadis pri lingvo-instruado ĉe aliaj esperantistaj paroj. Mi mem konis plurajn familiojn, kies infanoj parolis Esperanton kun unu el la gepatroj. Temis pri samnaciaj familioj en Hungario kaj Kroatio.

Ĉiu rakontis al ni pri reguloj kaj principoj, kiuj gravas. Ili mem elektis la principon *unu persono, unu lingvo*. Mi kredis, ke tiu principo estas bona

# Pluraj lingvo.

*Ĉu vi iam pensis fondi internacian familion? Zdravka Metz, kroatino edziniĝinta al kebekiano, rakontis dum la simpozio de*

*UEA “Internacia familio — Ĉu utopio aŭ realeco?” (Graz, Aŭstrio, 7-10 julio 1994) sian propran sperton kiel patrino de tri-lingvaj infanoj. Ŝia sperto de “profesia patrino” povas helpi kaj orienti multajn novajn internaciajn parojn, kiuj havas dubojn pri denaska plurlingveco.*

ankaŭ por nia familio. Sed tamen, ni vivas en lando, kie ne estas parolata mia gepatra lingvo, Esperanto estis nia familia lingvo kaj do kiu instruos la francan, kiel plej necesan lingvon por la ĉirkaŭaĵo? Normando, mia edzo, preskaŭ ne havis okazon resti sola kun la filo!

En Kanado ni renkontis du aliajn esperantistajn parojn. Ĉe unu el ili ambaŭ geedzoj estas germandevenaj, kiuj uzis la principon *unu persono-unu lingvo*. La dua internacia paro uzis nur Esperanton ĉiam. La anglan iliaj infanoj aŭdis de siaj geavoj kaj geonkloj, kun kiuj ili vivis, kaj la patrino ne instruis sian lingvon al la gefiloj. Iliaj infanoj havis problemojn en la unua jaro de la lernejo kaj ĉar ili jam estas pli aĝaj, ni rimarkis, ke ili entute ne montras intereson pri Esperanto kaj eĉ iom forgesis ĝin. Tiuj familioj ŝanĝis sian principon pro la lernejo kaj pro infana deziro, kaj uzas nur la anglan. Ni deziris plene vivĝui kun niaj infanoj kaj ĝis nun ili ne nur uzas ĝin sed tute nature kaj elkore partoprenas Esperantajn aranĝojn kaj same kroatajn renkontiĝojn en Montrealo.

Kial ni volis, ke niaj infanoj parolu tri lingvojn?

IJK: Internacia Junulara Kongreso

# i sur la lango

Zdravka Metz, Kanado

## EKZISTAS ORGANIZO DE ESPERANTISTAJ FAMILIOJ

Kvankam dum almenaŭ la lastaj kvardek jaroj oni vidis almenaŭ tri ondojn de familia agado — unu en la kvindĉkaj, alian fine de la sesdekaj kaj ankoraŭ unu meze de la sepdekaj — estis nur en tiu ĉi jaro, 1994, Jaro de la Familio, ke aro da familioj havantaj Esperanton kiel unu el siaj lingvoj firme konsentis unuiĝi en unu kolektivo. Tiu kolektivo, Rondo Familia, havas kiel ĉefan celon “okupiĝi pri la esperantisto de TEJO al TEJO”. Kion tio signifas? Ke kiam la gepatroj, interkonatiĝinte dum la TEJO-aĝo (kaj eble dum TEJO-aranĝo!), geedziĝas kaj naskas la unuan infanon, ili forlasas la movadon por “kaŝi” sin sub la familiaj devoj kaj nur kapablas reveni al ĝi, kiam ilia plej juna infano ne plu deziras ferii kun la gepaĉoj kaj decidas memstare vojaĝi al TEJO-aranĝo (ĉirkaŭ la 16-a jaraĝo). Pri tiu kritika periodo Rondo Familia okupiĝas. Al esperantistoj en tiu situacio ĝi redonas lokon en la movado.

Rondo Familia ekzistas sub la ŝirmo de UEA, sed ĝi ne estas unu plia faka asocio. Ĝi ne havas membrokotiĝojn nek eldonas membrokartojn, sed registras ĉiujn stabilajn familiojn, kun aŭ sen infanoj, sendepende de ilia movada engaĝiĝo. Ĝi elektas komisionon ĉiun duan jaron, ofertas bultenon, instigas al eldonado de publikaĵoj por infanoj kaj gepatroj kaj al plimultigo de renkontiĝoj, kun aparta emfazo sur la agnoskigo flanke de Unuigintaj Nacioj kaj aliaj inter-naciaj organizaĵoj al la internacia familio kaj ties rajto je plurlingveco, pluretneco kaj plurkultureco.

La ĉefa respondeculo nuna estas Renato Corsetti kaj lia adreso estas tiu de UEA. Se vi plenumas la kondiĉojn por aliĝi, ne plu restu izolita!

Mi komencis rimarki problemojn de nia principo, ke mi parolu nur kroate al la infano. Ankaŭ dum bofamiliaj renkontiĝoj mi ne sentis min bone alparolante mian infanon kroate, ĉar la aliaj ne komprenas. Tiam mi jam parolis france kun ĉiuj aliaj. Pri tiuj sentoj mi rakontis al unu esperantisto, lingvisto, kiu havas propran sperton pro uzo de pluraj lingvoj en sia hejmo.

Li konigis al mi pri rezultoj de enketo farita inter vjetnamidaj infanoj en Montrealo, aĝaj inter 12 kaj 16 jarojn. Tiuj infanoj scipovis la gepatran lingvon, sed tute rifuzis paroli ĝin kun la gepatroj. Al la demando pri kialo, li esprimis sian nekontentecon, koleron, kiun ili sentis pro la gepatroj. Ili rakontis, ke tiuj devigis ilin paroli vjetname eĉ kiam ili ludis surstrate kun angle aŭ france parolantaj geamikoj, kaj tiam ili ĉiam hontis kaj sentis sin kiel nigraj ŝafoj. Sed nun, en la aĝo de serĉado de la propra identeco, kiam ili kapablas esprimi sian volon, ili decidis paroli la lingvon de la medio, lernejo, strato. Konklude, infanoj estas spontaneaj kaj nature ne nur agas, sed ankaŭ pere de la lingvo ŝatas simili al siaj geamikoj. Tiu lingvisto sugestis al ni uzi novan principon: paroli lingvon, kiun ĉiuj komprenas.

Ĉiumatene ni daŭre uzis Esperanton kaj kiam foriris mia edzo, mi diris al mia filo, ke paĉjo foriris kaj ni parolu kroate. La saman frazon mi ripetis en la kroata. Kiel solvo por la franca, la televidilo helpis min. Kiam komenciĝis eduka porinfana programo, kun mia filo mi rigardis ĝin. Spektante, mi ripetadis frazojn pli malrapide, por ke li pli klare aŭdu kaj samtempe tio estis por mi maniero uzi la francan. Kompreneble, ŝanĝante la lingvon mi menciis la kaŭzon kaj diris la nomon de la lingvo. La francan mi uzis, kiam ni estis en la parko kaj aliaj homoj ĉeestis. Kompreneble, vespere, kiam Normando revenis, ni ĉiuj denove esperantumis. Tiel vivi estis ankaŭ por mi pli simple kaj malpli streĉe. Denove mi povus rakonti al vi anekdoton, kiun mi spertis.

Nia 20-monata filo bone rimarkis la malsamajn lingvojn kaj same progresis en ĉiuj tri lingvoj. Unu fojon, kiam mia edzo ludis kun li demandante, kiun lingvon li parolas kun kiu, la infano senerare nomis la lingvojn kaj personojn. Alian fojon vizitis nin francparolanta amikino. Normando revenis hejmen salutante nin de la pordo “saluton!”. Nia filo kuris al li dirante “Paĉjo, Mireille estas ĉi tie; parolu france!”

## Malfacilaĵoj

La unua malfacilaĵo okazis, kiam nia filo estis du-kaj-duon-jara. Li komencis uzi tri lingvojn en la sama frazo. Tiu lingva salato teruris min, sed dum unu monato, mi paciencie ripetadis frazon en nur unu lingvo, kiun ni uzis en tiu momento kaj petis, ke ankaŭ li ripetu ĝin. Nur poste mi aŭdis, ke tiaj konfuzoj ja okazas kaj pluraj gepatroj poste ĉesas uzi ne nepran lingvon por helpi al la infano.

Mi estis kuraĝigita de aliaj esperantistoj. Mi konsideris tian lingvan instruadon kiel mian laboron kaj mi retrovis energion por daŭrigi la interparoladon laŭ nia principo.

La dua malfacilaĵo okazis post feriado en Kroatio, kie dum du monatoj la infanoj kaj mi uzis nur la kroatan. Reveninte al Montrealo, nia tri kaj duon-jara knabo forgesis uzi la Esperantan kaj la francan! Li ĉion komprenis kaj bone

## Paĉjo, parolu france!

Kiam naskiĝis nia unua filo, mi nepre deziris, ke li scipovu mian lingvon. Mi planis viziti miajn familianojn en Kroatio kaj do volis, ke ankaŭ li estu komprenata. Do mi parolis kroate al li, kiam ni estis solaj. Samtempe eblis al mi praktiki mian lingvon, ĉar eĉ en propra lingvo vi mallertiĝas, se vi ne regule uzas ĝin — mi ja spertis tion.

Esperanton ni nature uzas, kiam ni ĉiuj estas kune: matene, vespere, semajnfine. Nia familio loĝas sola en Montrealo, for de familianoj. Longega vintro kaj malvarmo en Kanado kaŭzas, ke ĉiuj fermas sian pordon jam en septembro kaj vivas iom izolece ĝis majo. Nia filo naskiĝis ĝuste en la vintra periodo, en novembro. Do, la francan lingvon li aŭdis nur dum la jarfinaj festoj. Mi rakontos al vi anekdoton.

Dum ni tiel vivis, nur ni tri solaj, nia tiam trimonata infano timis najbarojn kaj amikojn, kiam ili venis vidi nin, esploris, se iu volis preni lin. Unu fojon vizitis min kroata amikino kaj mi atentigis ŝin pri tio. Sed ŝi ekparolis al li kroate, prenis lin en siajn brakojn, kaj li ekridis. Mi vere rimarkis la gravecon de parolata kaj komprenata lingvo.

respondis, sed nur kroate. Estis komike, kiam kelkaj liaj amiketoj provis imiti lin, ĉar ili ne komprenis lin. Unu patrino devis diri al sia filo: "ne provu paroli la lingvon de Damir."

Du semajnojn ni bezonis speciale stimuli lin por ke li reparolu la du aliajn lingvojn. Al mi rekomendis psikologo en Montrealo, ke ni uzu nur la francan, ĉar tion la infano bezonas.

Similan situacion mi poste travivis kun nia filino malgraŭ tio, ke por tiu feriado mi preparis vidbendojn kaj kasedojn kun infanaj kantoj en la franca, kaj ĉiuvespere mi interparolis kun ili aŭ france aŭ Esperante. Por la filo ne estis problemo, sed la tri-jara filino tamen forĝesis la du aliajn lingvojn. Tiun fojon ni ne plu tiom timis ĉar la antaŭa sperto helpis.

Tamen, jam dum la unua restado en Kroatio mi komprenis la gravecon de lingvo-uzo inter infanoj. Mi komencis cerbumi, kiel havigi al niaj infanoj kroatan medion de samaĝuloj. En Montralo troviĝas pli ol kvindek etnaj centroj, religiaj, sportaj kaj kulturaj. Feliĉe, ankaŭ kroatoj havas unu. Mi sciis pri la ekzisto de sabata lernejo, kie laboras volontule gepatroj. Sed tiu lernejo estas por infanoj inter 6 kaj 12 jarojn aĝaj.

Mi parolis kun la respondeculo de la centro kaj proponis, ke kadre de sabata, kroata lernejo, mi pretas labori — ludi, kanti, paroli, gardante 4-jarajn infanojn dum kvar matenaj horoj. Tiel estis organizita sabata vartejo, kiun mi gvidis dum tri jaroj ĝis mia filo ekvizitis la unuan klason. Kun li ankaŭ mia filino vizitadis, kaj mi, kiu instruis skribadon kaj legadon de la kroata. Krom la lingvo ili lernas popoldancadon, kantadon kaj religion. Pasis jam sep jaroj, de kiam ni tri iradas kroatumen en tiu komunuma centro ĉiusabate.

## Ŝanĝoj

Certe okazis iomete da lingvaj ŝanĝoj hejme. Temas pri la tasko-horoj, kiam ne validas nia principo. Sed krom tio mi mem daŭre uzadas tri lingvojn ĉar estas tiaj situacioj. La infanoj amikoj, kiuj venas en la domon, kaŭzas pli kaj pli oftan uzadon de la franca. Tamen, niaj gefiloj venas hejmen por la tagmeza paŭzo unuhora kaj kutime tiam estas ebleco daŭre uzi la kroatan. Tiam ni provas preni tempon ankaŭ por legado de iu rakonto aŭ poemo. Tio pliriĉigas ne nur la vortotrezoron sed ankaŭ diskuttemojn endome.

Tre frue mi komencis pri legado. Foje, kiam mi legis al 6-monata bebo, mi sentis min komika, ĉar li plej ofte ekdormis kaj estis kvazaŭ mi legis al mi mem. Ankaŭ mia edzo legis al li Esperantajn rakontojn aŭ foje francajn. Nun por Esperantaj rakontoj ni provas trovi tempon unufoje semajne ĉar la francan ili legas ĉiutage kiel taskon por la lernejo.

Tamen, vespere ni ludas uzante Esperanton, ĉar niaj infanoj estas tre ludemaj. Komprenoble, hodiaŭ la franca estas la plej forta lingvo de la infanoj. Ili senerare parolas ĝin. Tiom mi ne povas diri pri la kroata, kie ili eraras pri kazoj aŭ genroj, aŭ en Esperanto, kie foje mankas al ni vortoj. La influo de la lernejo, ĉiutagaj geomikoj, televido, alivorte, de la medio, havas la plej fortan efikon sur la infanoj. Tio estas ja natura, tiel ke la franca iĝis la lingvo de niaj gefiloj, kiam ili solaj interparolas.

Niaj infanoj ne havis problemon eniri lernejon. Eĉ komence neniu sciis, ke ili parolas tri lingvojn,




Foto © LF-koop

ĉar ilia franca parolado estis je la nivelo de iliaj samaĝuloj.

Antaŭ longa tempo mi aŭdis pri eksperimentoj, kiuj estis science analizitaj en Germanio pri Esperanto kaj la lernado de iu alia fremda lingvo. Ekde la pasinta aŭtuno ankaŭ ni havas tian sperton. Nia filo en sia kvara klaso komencis lerni la anglan. Por li tiu lernado iras sen malfacilaĵoj. Li estas unu el la plej bonaj en la klaso. Laŭ li nur unu alia knabo estas pli bona, sed tiu parolas angle kun sia patro angladevena.

Tiu tri-lingva denaska instruado certe helpas por pli bona memoro. Li ne nur facile memoras la signifon de la vortoj, sed ankaŭ mem rimarkas la similecon inter diversaj vortoj kun Esperanto.

Sed... Kion respondi al la demando, ĉu ni bedaŭras pri la endoma trilingveco?

## Bedaŭroj kaj malbedaŭroj

Certe ni ne bedaŭras, sed por esti sincera, foje, kiam mi laciĝas esti eterna lingva policano, kiu atentigas, kiam ni ne sekvas la principon, mi pensas, kiel simpla certe estas la vivo en nur unulingva medio kaj ĉiama uzo de nur unu lingvo. Sed jen la prezo de internacia paro.

Feliĉe, pli ofte ol tia umado okazas, ke iu esperantisto telefonas, venas viziti nin kaj la tuta familio plene ĝuas la babiladon. Foje venas ĉe ni avo, aŭ ni vojaĝas Kroatien kaj tiam mi pravigas la instruadon de ne nepre necesa lingvo en Kanado. Tiam fieras kaj tute forgesas fojajn suspirojn, ĉar por ni trilingveco estas bezono.

Kion diri pri la rilato inter internacia familio kaj monda paco? Mi kredas, ke jes, estas rilato, ĉar tia familio estas kvazaŭ nature malfermita al aliaj kulturoj. Estas pruvite, ke etno-centrismo estas danĝera. Esti fermita en propra nacio kaj kredi, ke estas ĝi la plej bona, plej justa, plej rajthava, estas iom forpasinta ideo, sed kiu bedaŭrinde hodiaŭ ankoraŭ estas praktikata ĉie.

Ni vivas en moderna mondo, mondo de internacia komunikado, kie neniu nacio povas resti izolita. Telekomunikiloj, interŝanĝo de kulturoj, internaciaj sportaj eventoj, edukado, propraj vojaĝoj aŭ kontaktoj, ĉio montras al ni la mondon plenkolora. Same, ĉiaspecaj homoj troviĝas en ĉiuj landoj. La moderna mondo estas mozaiko de kulturoj, kie ne gravas la deveno, sed la homa kvalito — la homeco. Kaj en tiu mozaiko gravas respekto, toleremo al ĉiuj personoj kaj kulturoj. Mi bone spertas tion en Montrealo, en Kanado, en Norda Ameriko, kiu daŭre allogas homojn de oriento, okcidento kaj sudo. Ĉi tie kvazaŭ jam okazas la estonto. Ĉio intermiksiĝas sub la regulo, ke ĉiu havas plenan rajton kaj ke ĉiuj estas egalaj. Mi opinias, ke mi rajtas diri, ke ne nur internacia familio, sed ankaŭ samnacia familio kontribuos al paco se ĝi estos malfermita al tia mondo, ne kun emo domini, mastri, sed respekti la aliajn malsamecojn per kunlaboro kaj kunagado.

Mi ŝatus ripeti vortojn de du levilkartetoj, kiujn mi ricevis de Movado Sen Nomo, pendigis en mia kuirejo kaj, komprenoble, parkerigis. "Paco en la mondo — unue en la propra familio" kaj "Paco en la mondo ne eblas sen interna paco". Laŭ tiuj diraĵoj ni provas eduki nin ĉiujn kaj tiel vivi. La frazo "paco, harmonio kaj amo, en vi kaj ĉirkaŭ vi", longe estis nia antaŭmanĝa preĝo. Ankaŭ nun, kiam necesas, ni ripetas ĝin. □



Se vi interesiĝas pri tiu ĉi temo aŭ estas mem fondonta internacia familion, eble analizojn de enketoj kaj tre interesajn raportojn de 66 internaciaj geedziĝoj esperantistaj utilos al vi. **Internacia geedziĝo**, Yokohama: EVA, 1983. 83 p. 26 cm. 19,80 gld.


Tre konciza, interesa kaj bele aranĝita estas la (unua) kajero **Denaska Dulingveco, konsiloj por gepatroj**. Respondoj al la plej oftaj demandoj koncerne la dulingvan edukadon de infanoj. Roterdamo: UEA, 1993. Red. Renato Corsetti. 21 p. 29 cm. 7,20 gld. ĉe UEA.

La voĉo de Nikolin' fariĝis fama ĉe multaj Esperanto-familioj pro i.a. unika kasedo, kiu kolektas lulkantojn traduke kaj originale kreitajn por niaj infanoj. **Laŭ lula ondo**, enhavas 11 kantojn, i.a. siberian, karelian kaj vietnaman. Svisio: LF-koop, 1990. 33-minuta 27,00 gld. ĉe UEA.

# Krucvorta konkurso

Ilkka Santtila, Finnlando

Sendu vian solvon  
al nia redakcio  
antaŭ la 31-a de  
januaro 1995.  
Inter la  
partoprenintoj  
ni lotumos  
libropremion.



## HORIZONTALA

5. Stelpinta, verda kaj ornamita
13. Venena
14. Nigra likvaĵo
15. Verbo de Donjuano
16. Enhavas valorpaperon
17. Gusto de malvenko
18. Retisto...
19. Parto de instrumento en buŝo
20. Potenca lando
21. Bestetoj, konataj pro amasmigradoj
23. Loĝanto de ebena eŭropa lando
24. Juna estaĵo
25. Fronta parto de domo
28. Prepozicio, montras malantaŭecon
30. Verbo, esprimas deziron kaj bedaŭron
31. Maljuna arbo povas esti...
33. Kurba, flava kaj glit-ŝela
34. Mamulido estas...
35. Mallaŭda vestadjektivo
36. Verbo, grava al studentoj
37. Maldolĉigi
38. Koscie ne atenti
39. lu ajn doktrino
41. Larĝa ŝtuparo
42. Sciencfikcia malpacajo
43. Ordinara ujo
44. Grupo de gigantoj
45. Loko por loĝantoj

## VERTIKALE

1. Fama tropika floro
2. Mezuras tempon
3. Eco de spico
4. Aranĝo por merkato
5. Sur la kapo de Julavo
6. Religi'
7. Blovinstrumento
8. Juspretiĝinta preĝejo
9. Verbo por perdinto
10. El ĝi oni faras ŝtofojn
11. Granda aro
12. Y
22. Surmetas kimonon
27. Mola manĝaĵo
28. Bakas multe
29. Ujo
30. Blua juvelŝtono
31. Spico, ofte uzata en pano
32. Milda ŝanĝigado
33. Gravaĵo al vojaĝanto
34. Malhelpas ŝtelistojn
36. Spongo estas...
40. Taŭgas en buŝo

Tibor Sekelj  
**Kumeŭaŭa**

Ree haveblas ĉi tiu populara romaneto tradukita en dudekon da aliaj lingvoj!

*Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo*, de T. Sekelj, Rotterdam: UEA, 1994 (2-a eld.). 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. 15,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

**La bona ingo**

KIELONI DIRAS AMO, TENERO KAJ SIMILE EN VIA LANDO?

KONDOMO!

# Kiu kredas je Julavo?

Abdullah Mossafi, Germanio

*“Komence de tiu ĉi novembro 1994 mi kun kelkaj amikoj veturis al la lando de Julavo. Vi certe jam ridetas kaj diras, ke li loĝas ĉe la Norda Poluso\* — tion ja scias plej eta infano, kaj ke neniu iam ajn vidis Julavon, ĉar li venas nur nokte por lasi la donacojn. Tamen, ekzistas alia ebleco: Julavo venas mem vespere kun sia sako. Tiel okazas en Nordio.”*

**J**am en la ĉefurbo de Finnlando, Helsinko, nin renkontis neĝo — por mi preskaŭ nekonata afero (en mia regiono, meza Germanio, apenaŭ troveblas tio!). Neĝis unue tre malmulte sed dum ni promenis tra la stratoj pli kaj pli da blanka, malseka io (nepriskribebbla!) faladis sur nin. Poste ni lernis, ke neĝo estas tre agrabla afero: precipe se oni glitas kaj falas, estas bone fali sur molan neĝon...

En la vagonaro norden al la urbo Rovaniemi, la ĉefurbo de la finna Laponio, mi havis pli da eblecoj konatiĝi kun Finnlando. La vagonaro veturis tra arbaroj sen fino. Finnlando havas nur kvin milionojn da loĝantoj, sed ĝia granda estas preskaŭ sama al tiu de Germanio. En la fora nordo, kien ni vojaĝis, vivas la Laponoj aŭ Sameoj — ankaŭ en Svedio, Norvegio kaj Rusio.

Unue ni vizitis la nordan poluscirkon: ĝi trakuras Rovaniemi. Nun ni sciis, ke ni estas en la vera nordo, proksimege al la norda poluso! Ankaŭ la neĝo jam estis alta en tiu ĉi loko kaj estis malvarme.

Ĉe la alveno al la landlimo de Julavo-lando, ni renkontis kelkajn Sameojn en iliaj tre specialaj vestoj. Ili kunhavis boacojn\* kaj faris fajron atendante nin. Ni trinkis varman boaco-lakton. Ĝi gustis tre forte, pli ol bovina lakto. Tio estis nia “pasport\*-kontrolo”. Nun ni rajtis eniri la landon.

La boacoj mirigis min, ĉar mi ĉiam imagis ilin pli grandaj. Tamen ili estas fortaj kaj rapide tiris nin en la unu-personaj sledoj\* en kiuj ni estis enpakitaj por la lastaj kilometroj ĝis la monto Korvatunturi, kie estas la loĝejo kaj eĉ vilaĝo de Julavo.

Kiam la boacoj haltis antaŭ la pordego, alvenis multaj koboldoj\* en ruĝaj vestoj por akcepti nin, kaj ankaŭ la Julavino. (Ĉu vi sciis, ke Julavo havas edzinon? Ŝi aspektas kiel li, sed sen barbo\*!). Ŝi bonvenigis nin en la varmon de la domo.

**Julvo:** alia nomo por Kristnasko. *Julvo* estas la nomo de nord-eŭropa festo antaŭ-kristana, poste anstataŭigita per Kristnasko.

**poluso:** la plej alta (norda) kaj malalta (suda) punktoj de la Tero

**boaco:** “ĉevalo” de *Julavo*

**pasporto:** libreto, kiu rajtigas vojaĝi eksterlande

**sledo:** glit-veturilo

**koboldo:** ludema speco de supernatura, homeca estaĵo

**barbo:** vira har-kreskaĵo en la suba parto de la vizaĝo kaj ĉe la kolo

**vidbendo:** “film-rulo” por televidilo

**banko:** komercejo de mono, kie eblas interŝanĝi, prunti, meti monon

En la domo troveblis tre multe da homoj kaj multe da vogleco. Ĉiuj laboris pri io, plejparte tamen pri leter-verkado. Mi demandis al iu koboldino, kio okazas. Ŝi klarigis, ke el la tuta mondo venas leteroj dum la tuta jaro kaj precipe nun, tuj antaŭ Krist-nasko. Ne nur infanoj verkas leterojn, sed ankaŭ plen-kreskuloj. Multaj sendas al Julavo simplajn dezirojn, aliaj, pli komplikajn. Al ĉiu respondas la koboldaro: foje en la japana, foje en la hispana... Multaj finnaj studentoj laboras en decembro kiel koboldoj en tiu ĉi Korvatunturi-centro respondante leterojn en diversaj lingvoj. Ĉiu, kies letero atingas nin, ricevas personan (ne kopiitan!) respondon. Tamen, — atentigis la koboldino, necesas skribi la ĝustan adreson sur la koverton por ke la letero certe alvenu. Ĉiujare ĉirkaŭ duon-miliono da leteroj atingas Korvatunturi. Nuntempe ankaŭ komputiloj kaj vidbendoj\* helpas al la Julavo atingi ties sekvantojn: li sendas foje vidbendon por saluti tiujn, kiuj ne povas mem viziti lin. Infanoj en malsanulejoj tutmonde, ekzemple.



En tiu ĉi oficejo oni donacas julavajn glumarkojn al ĉiu vizitanto.

La koboldino ankaŭ rakontis, ke la tuta Korvatunturi-projekto estas sub-tenata per fondaĵoj aŭ donacita mono. Nur la poŝta forsendo kostas pli ol kapablas pagi eĉ Julavo mem! Tial oni starigis poŝtajn interkonsentojn kun diversaj landoj, tiel ke la leteroj de Julavo povas sendiĝi senpage tra la mondo. Eĉ tiel ankoraŭ multekostas la tuto — la koboldoj ankaŭ devas ricevi labor-pagon, ekzemple! Tamen, la vendejoj en la vilaĝo tre bone gajnas — multas turistoj.

Ni eliris denove en la malvarmon kaj mallumon (en la nordo la vintra nokto daŭras tri monatojn!), kaj ĉirkaŭiris.

Vendejoj diversaj, kafejo, banko\*, infan-ĝardeno kaj eĉ poŝt-oficejo por sendi specialajn Julavo-markitajn leterojn... Fine ni venis al iu granda domo, kiu havis nomon: “Oficejo de Julavo”, kaj ni eniris. Tie sidis Julavo mem, en sia granda barbo blanka. Ĉirkaŭ li staris multaj homoj, ankaŭ multaj infanoj, kun kiuj li manpremis kaj interparolis. Kelkaj infanoj sidis sur liaj kruroj, pliaj pendis sur lia ruĝa robo. Foje aŭdeblis lia profunda kaj gaja rido.

Ankaŭ ni alproksimiĝis. Li vidis nin kaj salutis per granda rido. Kaj ni manpremis. Poste li iom babilis kun ni kaj demandis pri ni, ĝis venis aliaj, kiuj volis manpremi kun li. Li pardonpetis kaj ekparolis kun ili. Ĉe ni restis sento de tre plaĉa Julavo. Iu malalt-voĉe diris, ke ni feliĉu, ke ni persone povis renkonti lin, ĉar en decembro estas tiom multaj vizitantoj el la tuta mondo, ke apenaŭ eblas vidi lin! Fakte, en decembro al-flugas britoj, japanoj kaj aliaj per specialaj flugoj rekte al Rovaniemi.

Fine ni iris al la manĝejo por gustumi boacan viandon kaj aliajn manĝindaĵojn de la regiono. Bongustajn kaj samtempe nekutimajn mangaĵojn. Ni tiom satiĝis, ke ni nur sidis kaj miris, kiel ni povos iam foriri de tiu ĉi loko.

Vespere venis — kvankam pro la konstanta mallumo ni ne propra-okule povis sperti. Ni estis retransportataj al la landlimo, kaj subite denove trovis nin en Rovaniemi.

Nun mi povas diri al vi: mi ne nur kredas je Julavo, mi eĉ scias, ke li ekzistas! Ĉe Korvatunturi, Finnlando. □



facila

# Kaŝitaj vortoj

facila

Claus Günkel, Germanio

En jena liter-aro estas kaŝitaj la sube listigitaj vortoj. Ili aperas en ĉiuj direktoj: ↔ ↕ ↗ ↘ (vidu ekzemple "Ezopo"). Trovu ĉiujn kaj grizigu ilin. Farinte tion vi rimarkos, ke restas kelkaj kvadratetoj blankaj. La literoj, kiujn ili enhavas, en sin-sekvo formas ideon. Sendu tiun ideon al nia redaktejo antaŭ la 31-a de januaro 1995. Inter la solvintoj ni lotumos la libreton **50 fabloj de Ezopo plus muzik-kasedon**.

O	R	E	V	I	R	S	E	S	A
S	E	Z	O	N	O	J	U	O	R
U	L	N	T	M	K	D	P	N	B
N	U	O	E	S	O	M	A	U	O
R	N	R	B	B	E	T	O	T	O
A	O	T	U	T	U	P	V	Ŭ	R
D	V	N	N	R	O	L	K	A	A
I	A	I	O	Z	Ĝ	R	A	T	I
O	R	V	E	T	E	R	O	E	L
P	M	J	O	T	N	A	K	L	O
R	E	L	T	D	O	G	A	L	F
A	C	D	N	O	R	D	E	N	I
J	O	L	E	T	S	I	O	M	Ŝ
P	L	U	V	A	Ĉ	O	B	O	O

## Trovendaj vortoj

akvo - arbo - aŭtuno - birdo - ĉielo - Ezopo - fiŝo - floro - foliaro - kantoj - lago - luno - naturo - nebula - neĝo - norden - nubeto - pluvaĉo - printempo - rivero - sezonoj - somero - steloj - sudo - suno - sunradio - varmeĉo - vento - vetero - vintro

## anonctabulo

TARIFO: 0,50 gld. por ĉiu vorto. Tri informaciaj respondkuponoj por dek vortoj.

### Ĉu vi volas havi

24-jaran latvan plumamikinon? Mi kolektas anekdotojn, parfumojn kaj poŝtkartojn. Eblas respondo ankaŭ ruse kaj latve. Inga Briede p/k 1 / Indrānil LV-3720 Kronauce, Dobeles raj. Latvio

### Por ke ne malvarmiĝu miaj E-rondetoj

sendi esperantaĵojn diversajn a ili! Adreso: G. J. Motĉev, UA-3326866 s. Nova Kaizy, Berislavskij distr., Ĥersonskij-regiono, Ukrainio

### 21-jara studento

pri medicino deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj. Respondo garantiata. Fereidun Zandy Shohada Str. Ghannadi Hajebi Borujerd 69-137 Irano

### Estonta instruistino

deziras korespondi tumonde pri astrologio, orientalismo, filozofio, religio. Skribu al: Svetlana Litvinova A/k 2040 RU-656064 Barnaul-64 Rusio

Leteru ankaŭ vi al Julavo venontjare. Jen lia adreso:

Julavo  
Arkta Cirklo  
FI-96930 Rovaniemi  
Finnlando

En Esperanto ni havas belajn kristnaskajn kanzonojn. Jenaj kasedoj estas haveblaj ĉe UEA:

**FESTOJ DE KRISTNASK'.** Amplifiki. La fama E-rokgrupo en kristnaska humoro. 1990. 25,20 gld.

**JULA LANDO.** Kantas Nikolin'. Kristnaskaj kaj novjaraj kantoj diverslandaj. Svislando: LF-koop. 1988. 27,00 gld.

**KANTOJ EL HIMNARO ESPERANTA.** 9 kristnaskaj kantoj en po du variantoj. Kantas Bil Munsil. 1992. 24,00 gld.

# La angulo

de Ludmila kaj Petro

**la averaĝa energio** de unu fulmo egalas proksimume al 1000 kWh, kion oni povas kompari kun la kvanto de energio eliĝinta dum la eksplodo de unu tuno da trinitrotolueno (T.N.T.).



La mekanismo de ŝargiĝado al tiel grandaj potencoj ankoraŭ ne estas konata.


Dum mezpotenca tempesto kun kelkaj elektraj maŝaroj je minuto, la liverita energio egalas al la energio estigata en malgranda atomelektra centralo. Por ke tiu ĉi energio estu kolektita, la nuboj devas ŝargiĝi al potencialo de kelkcent-milionoj da voltoj.

## en meteorŝtonoj oni trovis


malgrandajn diamantajn kristalojn, kiuj enhavas atomojn de ksenono kaj kriptono kun nerenkontita izotopa konsisto. Kelkaj sciencistoj asertas, ke la kristaloj formiĝis proksime de ruĝaj kolosoj\* antaŭ ilia eksplodo kiel supernovoj\*\*.



\*Kiam la tuta ekvilibra stato perturbiĝas, stelo bezonas restarigi ĝin pligrandigante sian kovrilon, dum la kerno malgrandiĝas pro la premo de la gravitaj fortoj ene de la stela materio. Tiun ĉi stelon oni nomas ruĝa koloso. (Ruĝa, ĉar ĝi disradias ruĝan lumon kaj koloso pro ĝia grandeco).



\*\*Kiam la grandmasa stelo elĉerpas la nuklean brulmaterialon, ĝi povas iĝi supernovo. Tiam la kerno de la stelo enprofundiĝas pro la fortoj de sia propra gravitkampoj, kaj la energio tiam liverata kaŭzas la eksplodon de la ekstera kovrilo.



RESTAĴO

EKSPLODO DE SUPERNOVO

K = KERNO

# Rajto je la parolo

May Bijleveld, Brazilo



Tre interesan reason vekis "Gestuno", publikigita en KONTAKTO 141 (1994:3). Jen kial universala gestolingvo malmulte helpus kaj kiu estas la plej bona solvo.

Fotis Pieter de Monica

Kun granda intereso mi legis la artikolon pri Gestuno, kiu multe pensigis min, ĉar mi mem havas surdan filinon kaj pro tio bone konas la problemojn de la surduloj. Mi komprenas kaj tre respektas la deziron helpi la surdulojn de la tuta mondo por interkompreniĝi per Gestuno. Sed ... konante la eblecon instrui la parolkapablon — se oni komencas ekde la unuaj vivojaroj (en Nederlando oni diras "La instruo de surduloj komenciĝas en la lulilo"), mi pensas, ke instrui gestojn taŭgas nur por tiuj, kiuj jam estas tro aĝaj por lerni paroli.

Mia filino Marina naskiĝis surda en Rio-de-Janeiro. De 1954 ĝis 1964 ŝi vivis en Nederlando kaj lernis paroli en surdulleerjo en Hagoo. Kvankam ŝia aŭdkapablo estas je malpli ol 10% de la averaĝo, ŝi parolas flue la nederlandan kaj portugalan lingvojn. Ne perfekte kiel aŭdantoj, sed ŝi facile konversacias kun ĉiuj, ĉar ŝi lernis liplegadon. Pro ŝia prononcmalmaniero, en Brazilo ŝi diras, ke ŝi estas nederlandano kaj al nederlandanoj, ke ŝi estas brazilano. Ambaŭ estas veraj.

Reveninte al Brazilo, ŝi lernis la gestolingvon de siaj novaj surdaj amikoj. Unue en Rio-de-Janeiro. Sed poste en San-Paŭlo ŝi spertis, ke tie estas alia gestodialekto, eĉ kun diferencoj

## Kelkaj bazaj metodoj uzataj por instrui la parolon al surduloj

La instruisto kaj la eta surdulo sidas unu apud la alia ĉe tablo. Antaŭ ili estas spegulo, kie ili povas vidi sian propran buŝon.

La instruisto elektas objekton, kiu interesas la infanon, kun ne komplika nomo, ekzemple pupo. Se en la uzata lingvo ekzistas unusilaba vorto, des pli bone. En la nederlanda, ekzemple, *aap* (simio), estas tute bona por tio. Sed nun *pupo*. La instruisto montras la pupon kaj diras

klare: *pu-po*. Por prononci la *p* oni blovas kun la lipoj kune kaj antaŭen. La infano metas sian manon antaŭ la buŝon de la instruisto kaj sentas la blovon. Tion li devas imiti. Ankaŭ poste li sentas ĉe la gorĝo, ke tie ne estas vibrado. (Poste ĉe alia vorto, ekzemple *bebo*, li sentas, ke prononcante la *b* okazas vibrado ĉe la gorĝo). Nun la *u*. Denove li rigardas la buŝon de la instruisto kaj komparas kun sia buŝo — eĉ kun du

inter lernejoj. Oni povas diri, ke Gestuno havas kialon por ekzisti... se oni ne konas la metodojn por *paroligi* la surdulojn.

La unua bezono de la homoj estas komunikiĝi kun sia proksima ĉirkaŭaĵo. La unuaj kontaktoj estas kun la homoj de la propra familio. Ili ĝenerale lernas gestojn kune kun la infano surda, sed kuzoj kaj najbaroj plej ofte ne faras tiun klopodon. La surda infano, kiu bezonas amikojn, kiel ĉiuj, estas tre sola, sentas la apartigon de la normala mondo. La aŭdantoj evitas kontakton kun li pro la neebleco de normala konversacio, ne volante montri sian nekomprenon, kiam la surdulo vane klopodas eligi kelkajn parolatajn vortojn. La sola konversacio de vizitantoj estas: "Bonan tagon. Kiel vi fartas?" Post longa konversacio kun la aŭdantoj, forirante ili diras al la surdulo: "Ĝis revido. Fartu bone!" Nenion plu. Tial en ĉiu urbo ekzistas klubo de surduloj sen ia klasdiferenco. Ili bezonas unu la alian. Ili estas bonaj helpemaj amikoj. Vera getto.

Bedaŭrinde, en pluraj landoj ekzistas la pesimista opinio ĉe la tuta popolo, ke estas neeble transdoni la parolkapablon al surduloj. Ankaŭ en Brazilo, escepte de kelkaj privataj lernejoj, kiuj klopodas paroligi la surdulojn. Sed ĉie ĉiuj parolas ĉiam pri *surdmutuloj*, kvazaŭ ne ekzistus alia ebleco. Kaj jen ekzemplo: ĵus denove okazis granda manifestacio ĉe la marborda avenuo tie ĉi, en Rio-de-Janeiro. La surduloj postulis siajn rajtojn: oficialan rekonon de la gestolingvo, instruadon de gestoj al aŭdantoj por komuniki kun la surduloj ktp. Kiam Marina parolis dum du minutoj televide, pluraj surduloj kaj aŭdantoj kolere reagis al ŝi, dirante: "Vi devas uzi gestojn por montri, ke vi estas surda!!!"

Se vi volas senti iomete la situacion de surdulo, sidiĝu antaŭ via televidilo, malŝaltu la sonon kaj nur rigardu. Vi ne lernis liplegadon. Imagu, ke vi estas kune kun tiuj personoj kaj ke vi volas partopreni en ilia konversacio. Vi ne komprenas, kial ili ridas aŭ ploras. Vi demandas. Neniu respondas, neniu atentigas vin. Jen la situacio de surdulo, kiu lernis nek paroli nek liplegi.

Kial instrui al surduloj internacian gestolingvon, se uzante gestojn ili ne sukcesas komuniki eĉ kun sia propra ĉirkaŭaĵo?

Oni volas, ke Gestuno estu Internacia lingvo. Sed ... por kio taŭgas internacia lingvo?

1. Por vojaĝi. Bone, surduloj povas vojaĝi eksterlanden, sed multaj el ili ne estas riĉaj.

2. Por telefoni al alilingvanoj. Por fari tion per gestoj oni bezonus vid-telefonon. Nur por kelkaj riĉuloj tio eblas.

3. Por skribi leterojn. Por tio Gestuno ne helpas.

Eĉ skribi leteron en sia propra gepatra lingvo estas malfacile por denaskaj surduloj, ĉar ili ne bone konas sian lingvon. La vortprovizo estas tre malgranda kaj pri gramatiko ili scias tre malmulte. Pro ĉio tio la ne bone instruita surdulo ankaŭ malmulte legas librojn kaj gazetojn. Tial li scias malmulte pri la ĝenerala normala scio inter la aŭdantoj. La aŭdantoj ofte pensas, ke surduloj estas malinteligentaj. Tute ne! Ekzistas multaj inteligentuloj inter ili. Sed kiel ili povas lerni, kiam la "lernejo" (la konversacioj de la ĉirkaŭantoj) estas fermita? La mondlernejo strikas antaŭ ili.

La surduloj de la tuta mondo petas parolinstruon. Helpu disvastigi tiun ĉi ideon! □

speguloj por vidi sian buŝon deflanke. Nun kune *pu*, poste *po*, poste *pu-po* malrapide, poste pli rapide. Ofte necesas fari desegnon de la interno de la buŝo por montri la pozicion de la lango.

Samtempe estas tie bildo de pupo. Apud la bildo estas la skribita vorto (en preslitera formo). La infano devas kopii ĝin. Tiel li lernas koni la signifon, legi kaj skribi la vorton, ĉion samtempe. Kun aliaj vortoj, la sama metodo.

Nun la instruisto traŭnas la vortojn de la bildoj. Li miksas ilin, kaj nun la infano devas serĉi la ĝustan vorton kun la bildo. Vera ludo.

Nun ĉiuj bildoj estas sur la tablo. La instruisto nomas unu el ili kaj la infano montras la koncernen vorton.

Nun nur la vortoj estas sur la tablo. Denove la instruisto diras la vorton; nun la infano devas elekti la ĝustan skribitan vorton.

Poste la infano devas elekti vorton kaj prononci ĝin. La instruisto


montras tion, kion li aŭdas, kaj ĉiam laŭdas la klopodojn de la infano.

Poste venas diktado de la instruitaj vortoj sen bildoj ktp. Iom post iom oni formas frazojn.

Oni instruas ankaŭ la sonvolumon de la silaboj. Kelkaj instruistoj grasigas la literojn de la forta silabo. Ekzistas instrumentoj, kiuj montras la volumojn de la vortoj kaj la intonacion de la frazoj. Antaŭ la buŝo de la parolanto estas la eniro de tubo. Tiu tubo iras al vertikala vitra tubo.

La spiro de la elparolo iras tra la unua tubo kaj igas supreniri malpezan objekton en la vertikala tubo montrante la forton de la spiro, same la forton de la silaboj kaj eĉ tiun de la frazpartoj.

Kiam la infano havas tre etan reston de aŭdkapablo, oni eĉ instruas blovi fluton kune kun la notliniaro. Poste oni analizas la intonacion de la prononcota frazo kaj skribas tion per notoj. Nun la etulo vidas, ekzemple, ke ĉe demandoj la voĉo supreniras.



*Jatara Tendo*  
Eltatarigis Sabira Ståhlberg, Germanio

facila

## La vesto de sufio

Iu diris al sufio\*, ke li vendu sian veston:

— Vi povas gajni monon, se vi vendas vian veston!

La sufio pripensis kaj respondis:

— Vidu, kara amiko, se mi vendus mian veston, tiam mi estus kiel fiŝisto, kiu vendis sian fiŝkaptilon: ne plu li povas kapti fiŝojn!

## Stulta muezino kaj stulta mulao

Muezinon\* foje vidis iuj junuloj ekster minareto\*. Li estis survoje al la minareto por voki la popolon al preĝohoro en la moskeo\*. En la mano li tenis libron de preĝoj Islamaj, kaj li iom altvoĉe legis el ĝi pied-irante. La junuloj miris kaj demandis lin:

— Estimata muezino, kion vi faras? Ĉu vi vokas al preĝo per libro? Ĉu vi ne konas el memoro la preĝojn, kiujn vi ĉiutage uzas?

Sen levi la okulojn el la libro, la muezino diris:

— Iru demandi la mulaon\*!

La junuloj iris al la mulao. En tiu momento la mulao staris antaŭ la pordo de sia domo. La junuloj salutis:

— *Assalamealeikum!* (Pacon al vi!)

La mulao agis kvazaŭ li ne aŭdis la saluton, kaj eniris la domon. Tie li prenis libron kaj elvenis, staris antaŭ la junuloj kaj foliumis ĝin. Nur tiam li respondis:

— Kaj pacon al vi! — sen levi la okulojn el la paĝoj de la libro.

La junuloj nur gapis.

— Ne, ankaŭ la mulao agas tiel! ili diris kaj foriris.

**minareto:** altega kaj mallarĝa el-star-ajo de

moskeo, de kies supro muezino alvokas por preĝo

**moskeo:** preĝejo de Islamanoj

**muezino:** Islama kristo, anoncanto de preĝohoroj

**mulao:** speco de Islama pastro

**sufio:** membro de kaŝa Islamo, havanto ordinare de nur unu vesto tre eluzita, disŝirita. Ofte sufioj havis nenion alian en la mondo kaj vivis de petado. Kutime riĉuloj helpis ilin.

# Kiu volas pli, povas pli

Claude Piron, Svislando

tre  
facila

**T**ridek-jara mi iĝis hodiaŭ, diras al si Sandra, sed antaŭ ol ŝi havas tempon plu pensi pri tiu grava viv-ŝanĝo, jam eksonas la telefono.

“Feliĉan naskiĝ-tagon!” bondeziras Berĉjo, la sportema amiko, kiu volus esti pli ol amiko. “Mi invitas vin ĉi-vespere. Vi decidu, kien. Kien vi volos iri, tien mi veturigis vin.”

“Dankegon! Venu post la laboro. Mi diras al vi, kion mi elektis.”

Bone, ŝi do ne estos sola, ŝi iel festos la specialan tagon. Ŝi devus kontenti, senti sin feliĉa. Sed tiel ne estas, Berĉjo ... Estas tiom da miskompreno en ilia rilato! Ŝi ne pretas doni, kion li deziras.

Ne de longe ŝi estas hejme, kiam li alvenas.

“Ni iru al la Antila Danc\*-ejo”, ŝi diras. “En la apud-mara urboparto. Ĉu vi konas?”

Klare, ŝia elekto ne plaĉas al li.

“Ne. Mi tute ne konas. Kiaj homoj vizitas tiun ejon?”

“Maristoj, precipe. Ankaŭ laboristoj, ĉefe el landoj transmaraj.”

Pli ol ion alian, ŝi deziras ŝanĝon, por marki la specialecon de la tago. Eliri el la ĉiu-tag-eco. Kaj kie ĉi-urbe trovi mondon malsimilan, se ne ĝuste en tia maristejo? Sed videble Berĉjo ne sam-opinias. Ne en la samaj lokoj ili sentas sin hejme. Tial, antaŭ ol iri al la dancejo, li invitas ŝin al riĉula loko, kie ili povas festece vesper-mangĝi. Kiam, post la fina trinko, li provas ŝanĝi ŝian decidon, ŝi ne lasas lin superi. Al la Antila Dancejo ŝi volas iri, ne aliloken. Kion li povus fari, krom jesi?

Kiam ili eniras la ejon, ŝi sentas sin ege kontenta. Tiu muziko! Tiuj ridoj! Ĉio ĉirkaŭa plaĉas al ŝi ... kaj al li malplaĉas. Ke preskaŭ ĉiuj homoj ĉi tie estas nigraj\*, tio estas por ŝi kiel libertempi en malproksima sun-plena lando. Por li, troviĝi en loko timinda.

Sian malplezuron li provas forgesi per dancado. Kaj jen, malfrue en la nokto, prezentiĝas danco tiel longa, kun tiaj vivo-forto kaj pied-mova rapideco, ke la tuta publiko povas nur sidi tuj post ĝi. Ŝajnas al la homoj, ke ili ne plu havas piedojn: la danco formanĝis ĉiujn iliajn fortojn.

La muziko rekomenciĝas, sed kun aliaj ecoj ol antaŭe: dolĉa, malrapida, pensiga

pri fora hejmlando. Kun ĝi ĉi-foje kantas nigra junulo, tiel bele, ke baldaŭ ne plu aŭdiĝas parolo ĉe la tabloj. La kanto enhavas ion dolĉe malfeliĉan, kio pense vojaĝigas kaj naskas en la aŭdantoj kunsentojn kun fora, malfacil-viva popolo.

“Haitia kanto!” diras Sandra, preskaŭ ne aŭdeble. Ŝi ekstaras. Ŝi ne plu povas resti sida. Ŝi devas danci. La sento de senpiedeco estas for. Ĝuste samtempe kun ŝi stariĝis nigra knabo je la alia flanko de la danc-loko. Ili rigardas unu la alian signife. Ŝi eĉ ne ĵetas rigardon al Berĉjo. Ŝi direktas sin al la ali-flankulo, kaj tuj komencas danci kun li.

“Mi ŝategas tiujn haitiajn kantojn,” ŝi diras.

“Mi estas el Haitio”, li respondas.

Neniam ŝi sentis ion tiel fortan por knabo. Ĉu eblas ek-ami, en nur unu minuto? Eble jes, ĉar ankaŭ li...

“Mi miras pri mi,” li diras. “Mi neniam

sentis min tiel bone, kiel nun. La fakto teni vin... Mi dancas en-ĉiele. Kun multaj knabinoj mi dancis. Sed neniam kiel nun.”

“Mirige!” ŝi respondas. “Ĉiun vorton, kiun vi uzis, mi povus diri mem sen misformi la veron. Hodiaŭ estas mia naskiĝtago. Mi ricevis la plej belan donacon: danci kun vi.”

Kiom-jara vi iĝis?”

“Tridek. Kaj vi? Kiom vi aĝas?”

“Dudek du. De la alto de viaj tridek jaroj, vi certe vidas min infano.”

“Tute ne. Ĉu vi vidas la ulon tie? Estas Berĉjo, kiu venigis min en sia aŭto. Li estas tridektrijara. Ĝranda ĉiudirekte, kiel bestego, sed dekoble pli infana ol vi. Mi estas ludilo por li. Kun vi mi sentas min virino.”

“Kion opinias Berĉjo pri tio, ke vi dancas kun mi?”

“Li certe malkontentas. Ne gravas. Li havas nenium rajton super mi.”

“Sed ĉu tion li scias?”

Pensigaj vortoj! Ŝi ne respondas. Li sentas ŝanĝeton en ŝi. Io disfalis en ŝia ĝisnuna senmanka feliĉo, io, kion li ĝuste komprenas:

“Ĉu vi timas lin?”

“Ĝis nun mi neniam timis. Knabeto ne estas timinda. Sed li estas forta. Nun mi unufoje demandas min, ĉu li povus esti perform\*-ema.”


“Ne timu. Se li volos malbonfari al vi, mi apud-estos. Mi ne lasos lin aĉe agi.”

Ŝi rigardas la kundancanton pli bone. Li estas meze alta, ege maldika, tute ne fortulo. Homo, kiu ne sufiĉe mangĝis infanaĝe. Ĉu ia ek-amo igas lin miskalkuli la forto-rilaton inter si kaj Berĉjo?

“Kiel vi nomiĝas?” ŝi demandas. “Mi estas Sandra.”

“Kaj mi Maks. Aŭ Makso, se vi preferas.”

“Maks, vi certe estas bonulo, sed,



Martin Burkert, 1994

pardonu min, vi ne ŝajnas tre forta. Berĉjo ĵetus vin teren en malpli ol minuto.”

“Vera forto ne kuŝas en la manoj aŭ la aliaj membroj de homo, forto estas en la volo kaj en la rigardo. Tian forton mi havas en mi.”

# KONTAKTO

## JARKOLEKTO '93

**Se vi ne ricevis nian revuon pasintjare, nun vi havas la eblon aĉeti unuopajn numerojn!**

Numeroj 1, 2, 3 kaj 4 kostas po 4 gld. kaj la duobla numero 5-6 kostas 6 gld.

Se vi mendas la tutan kolekton, vi pagas nur 18 gld. Se vi mendas minimume 3 kompletojn, vi ricevos rabaton de 1/3 kaj sekve vi pagos nur po 12 gld.! **(Atentu kluboj kaj kurs-gvidantoj.)**

La prezoj inkluzivas sendokostojn. Por la landoj de la Eŭropa Unio aldoniĝas 6% por imposto. Menu ĉe UEA!



Li parolis tiel simple kaj sen-time, ke ŝi ege miras. Kaj jen la danco finiĝas. Li reiras kun ŝi.

“Ĉu vi permesas, ke mi sidu ĉe via tablo?” li demandas Berĉjon.

“Ĝenerale, kiam du ge-homoj sidas kune, bon-manierulo ne intermetas sin. Li lasas ilin solaj,” respondas Berĉjo, kiel oni parolus al senvalorulo. Li rigardas Makson, de supro ĝis malsupro, de dekstre maldekstren; klare, li trovas la Haitianon ridinde juneta, maldika, neforta. Sento pri supereco radias el li, kaj li aldonas: “Tiel oni faras en lando kun urba kulturo. Verŝajne ĉe nigrujoj estas alie.”

La reago, kiun li volis kaŭzi, preskaŭ aperas: dum minuterio, la knabo ŝajnas preta frapi, sen zorgi pri tio, kion signifus kontraŭfrapo fare de viro tiom pli forta. Sed li nur ridetas. Li rigardas Berĉjon. Berĉjo rigardas lin. Li rigardas Berĉjon plu kaj plu. Berĉjo tenas la rigardon, sed pli kaj pli rimarkeblas, kiom malplaĉas al li la situacio, dum Makso sin sentas hejme en ĝi, plu ridetas, kiel ĉe placa ludo. Iom post iom, malforto, preskaŭ senpoveco, legiĝas en la sid-maniero de Berĉjo. Li estas la unua, kiu for-turnas la rigardon.

Nur tiam Sandra rimarkas, ke neniu parolo aŭdiĝas en la ejo, kaj ankaŭ ne muziko. Ĉies rigardoj turniĝis al Berĉjo kaj Maks.

Ankaŭ Berĉjo tion rimarkas. Eĉ se neniu aŭdis, ĉiuj komprenis: li uzis vortojn ne akcepteblajn por nigrujo. Lia maniero paroli, rigardi Makson, tion plej klare montris. Kun io ne-certa en la movo, li rigardas ĉirkaŭen. Li komencas timi. Forta li certe estas, sed estas tiom da homoj en la dancejo! Ili ne montriĝas aparte amikaj. Li ree alparolas la junulon, superece:

“Mi mis-elektis la lokon. Mi iros al ejo kun homoj bonmanieraj. Venu, Sandra, ni foriras.”

Ŝia respondo sonas kiel frapo:

“Eble vi foriras, sed mi ne.”

Li rigardas ŝin, kiel ĉefo subulon. Sed okazas la samo, kiel kun Maks: Ŝi tenas la rigardon pli longe ol li.

“Kiel vi volas,” li fine diras, ekstare.

Kiam la pordo malfermiĝas post li, la tuta sidantaro aplaŭdas\*, kaj mult-manierere, ridete, ridege, parole, elmontras kontentegon.

“Muziku!” iu vort-ĵetas, kaj la muziko reviviĝas kun forto.

Kun brila rideto Makso ĉirkaŭ-rigardas. Li altigas la kunmetitajn manojn, kiel iu, kiu post sukceso en sporta ludado, dankas la publikon. Li turnas sin al Sandra:

“Sinjorino, ĉu vi permesas, ke mi invitu vin al danco?” Li parolas grave, senride, plej bonmaniere, sed brilo en la rigardo malkaŝas ridemon.

“Estas vera plezuro, sinjoro,” ŝi respondas, sam-lude.

“Kaj post la danco, sinjorino, ĉu vi akceptos, ke mi kun-iru via-hejmen?”

“Tio estus tre plaĉa, sinjoro. Tiom pli plaĉas, ĉar nun-tempe, multas problemoj kun la servistaro.”

“Ĉu vere? Kion vi volas diri?”

“Mia ŝoforo\* foriris, lasis min senaŭta.”

“Kun mi, vi povas estis certa, ke tio neniam okazus.”

“Kompreneble, vi ne estas servisto.”

“Tamen mi estas je via servo. Sed ĉu vi konsentus, ke anstataŭ Mercedeso ni uzu piedojn?”

“Mi jesus, se mi ankoraŭ havus piedojn, sed la dancado ilin forprenis. Eble vi povus porti min. Ĝis la aŭtobuso.”

“Mi certe ne estas sufiĉe forta por tio, sed ĝis mia ĉambro en la apuda domo mi senprobleme sukcesos.”

“Sinjoro, sinjoro Makso, kion vi diras? Ĉi vi jam forgesis, ke forto kuŝas en volo?”

**aplaŭdi:** montri kontentecon per man-frapado

**danci:** bele movi sin ĉe muziko

**nigra:** kiu havas la koloron de nokto

**per-forti:** fi-uzi forton por devigi iun fari ion

**ŝoforo:** veturigisto





Viaj reagoj kaj sugestoj estas bonvenaj ĉe nia adreso.  
La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la legantoj.

## La angulo

Mi ĉiam legas *La angulon* de *Ludmila kaj Petro* kun intereso. Rilate al "skribu vorte iun ajn numeron" en *KONTAKTO* 142 (1994:4), supozeble la aŭtoroj evitis tro komplikajn klarigojn kaj tial neglektis esceptan sed interesan kazon, kiu teorie eblas. Povas okazi, ke la koncerna lingvo ja havas "fiks punktan ciferon" (= ciferon, kies nombro da literoj egalas al ĝia valoro), kiu tamen ne ĉiam estas atingebla: ĉu finfine havi tian ciferon aŭ periode migri eterne inter kelkaj ciferoj ĝenerale dependas de la elekto, per kiu nombro komenci.

Jen mi prezentu ekzemplon per artefarita nombrolingvaĵo: 0 = *nas*, 1 = *uns*, 2 = *bes*, 3 = *unbes*, 4 = *vars*, 5 = *unvars*, 6 = *bevars*, 7 = *ohtiumnis*, 8 = *ohtis*, 9 = *unohtis*, 10 = *mane*.

Se ni komencas per 0, 1, 2, 3, 4, 5, 6, 8, 10 ktp, ni certe atingas 4 aŭ 6, kiuj estas sekvataj de si mem. Dume 7 kaj 9 faras alian grupon, similan al izolita insulo, el kiu eskapi ne eblas. (Se diri matematike, en nia mapado ekzistas kaj simplaj aŭ unuperiodaj fikspunktoj 4, 6 kaj du-perioda fikspunkto 7, 9, kiuj respektive havas sian altir-regionon, kaj al kiu el ili altrigi dependas de la komenca elekto. Tiu ĉi artefarita modelo nur pravas eblecon; mi scivolas, ĉu troviĝas reala ekzemplo ie sur la Tero.

Kaj kiel estas en la japana lingvo? Nu, japanoj kutime ne skribas per latinaj literoj, sed per kanaoj (proksimume silabaj literoj por la japana), kiujn via komputilo eble ne traktas. Krome, ni uzas du seriojn da numervortoj, nome la arabajn kaj la ĉin-devenajn. Ĉiuokaze mi montru la rezulton, surbaze de la ĉin-devenaj en kanao, transskribante ilin per Esperantaj literoj:

1 = *i-ĉi* (2-litera)  
2 = *ni* (1-litera)  
3 = *sa-n* (2-litera)  
4 = *jo-n* (2-litera) aŭ *ŝi* (1-litera)  
5 = *go* (1-litera)  
6 = *ro-ku* (2-litera)  
7 = *na-na* aŭ *ŝi-ĉi* (2-litera)  
8 = *ha-ĉi* (2-litera)  
9 = *kju-u* (2-litera) aŭ *ku* (1-litera)  
10 = *ĝu-u* (2-litera), ktp  
(La kunmeto estas tute Esperanta, ekzemple 27 estas *niĝuu nana*).

Konklude, ĉiuj nombroj rapide fariĝas ripetitigo de 1, 2.

OoŝIDA Takeŝi,  
Scienca Fakultato de la Universitato  
de Kioto, Japanio

## Bone, sed...

Pri Gestuno en *KONTAKTO* 141 (1994:3): Bone estas instrui gestolingvon al surduloj, sed pli bone estas instrui la parolon al la surda bebo. Antaŭ multaj jaroj mi verkis artikolon por *KONTAKTO* konsilantan gejunulojn, ke ili elektu la surdulinstruadon kiel profesion. Tiu labormerkato ankoraŭ havas multajn vakuojn, kaj estas samtempe feliĉiga laboro!

Estis tre bone, ke vi publikigis tiun artikolon. Fartu feliĉa sciante, ke per via laboro vi povas esti "plifeliĉigisto" por homoj de la tuta mondo. (Claude Piron pravas. Ĉiu laboro bone farita feliĉigas la homojn.)

May Bijleveld, Brazilo

## Finaj sankcioj

Iu iam diris, ke ekzistas tri veroj — via, mia kaj ununura, vera vero. Skribante sian reagon, mi supozas, Zoran deziris nur aldoni al via, jam konata vero, unu veron, kiu estas mapli konata.

Marcus diras, ke Slovenio estis nur objekto en la internacia politiko. Estus bone scii, ke tamen slovenoj kaj kroatoj mem insistis eniri komunan ŝtaton kun serboj ĉar tiamaniere ili evitis la efektivigon de la Londona Kontrakto el 1915, kiun Italio subskribis kun Aliancitaj Landoj. Laŭ tiu Kontrakto, Slovenio estus dividita inter Italio kaj Aŭstrio. Italio prenis ankaŭ la plej grandan parton de Dalmatio, kaj Kroatio iĝus malgranda kontinenta ŝtato, des pli ĉar ankaŭ Serbio havus la rajton preni teritoriojn, kie loĝas serba malplimulto. Do, Slovenio kaj Kroatio havis intereson eniri la unuan Jugoslavion (tiam Reĝlando de Serbio, Kroatoj kaj Slovenoj).

Pri la toleremo de la otomana ŝtato, Marcus tralegu la libron *La ponto super Drina*, de nobelpremiito Ivo Andrić, kaj li ekscios multe pli pri la otomana ŝtato kaj pri la hodiaŭa situacio en Bosnio. Mi volonte donacos al li germanlingvan eldonon de tiu libro, se mi scius lian adreson.

Cetere, ĉe ni estas tiel, ke oni ne nepre devas havi la saman opinion de sia registaro. Ĉu en Germanio jes?

Laste, kompari la hodiaŭan Jugoslavion kun la hitlera Germanio estas malbone.

Renato Petrović, Jugoslavio  
**Red.: Per tiu ĉi reago fermiĝas la diskuto en KONTAKTO.**

# La saĝa viro

facila

Ọshọ-Davies Olúwábùnmi, Niĝerio

Iam viro venis labori kun sia filo en ter-kulturejon. Baldaŭ la knabo kaptis birdeton, sed la laborema viro ne sciis, kio okazas. Post iom da pensado, kion li faros, la filo ekdeziris erarigi sian patron kaj subite kriegis:

— Patro, mi trovis birdeton kaj jam metis ĝin en-poŝen. Jen demando: "Ĉu la birdeto ankoraŭ vivas aŭ jam mortis?"

La infano pretis mortigi la birdeton per man-premego, se la viro respondos, ke ĝi ankoraŭ vivas; aŭ lasi ĝin, se li respondos, ke ĝi jam mortis. Li deziregis povi fine respondi: "Vi eraras, patro; vi estas stultulo!"

La viro longe ne sciis, kion respondi al sia infano. Li rimarkis, ke la junulo ne elmovas sian manon el la poŝo. Li sciis, ke la filo deziras elmontri, ke li estas pli saĝa ol li. Tuj li memoris unu el la popol-diraĵoj de Joruboj: "Junulo eble havas same multe da vestaĵoj kiel maljunulo, sed li ne povas havi vestaĵaĉojn same multe kiel maljunulo." Li do pensadis pri ĝia kaŝita instruo: la vestaĵaĉoj signifas la sperton, kiun la maljunulo jam havis, eĉ antaŭ la naskiĝo de la junulo. La vestaĵoj signifas la nunajn spertojn, kiujn la junulo kaj la maljunulo samtempe havas. Li memoris, ke pro liaj antaŭaj spertoj, li devus esti pli saĝa ol la infano — kvankam li ne sci-povis legi kaj skribi, kiel la filo, kiu vizitas lernejon.


Finfine li ekrespondis:

— Mia kara filaĉo, ĉu la birdeto vivas, ĝi restas en viaj manoj; ĉu ĝi mortas, ĝi ankaŭ restas en viaj manoj.

— Kion vi celas...? — la filo kun malcerteco demandis.

— Mi celas, mia aĉa filo, ke ĉu ĝi vivas aŭ ne, tio dependas de via decido.

— Ja, — respondis la knabo — patro ĉiam estas pli saĝa ol lia infano.



## Krucvorto

Mi ege ĝuis solvi la enigmon *Bellertaj Konkursoj!*

Peter Hansen, Kanado

En *KONTAKTO* 141 (1994:3) vi skribas, ke oni diras, ke la krucvortoj de la revuo estas tro malfacilaj. Mi opinias la malon; krome mi pensas, ke estas lacige publikigi nur krucvortojn kiel tempopasigilojn. Mi ĝuis solvante la logikproblemon *Bellertaj Konkursoj!*

José L. Cruz García, Kanario

Mi preparas min por nova ekzame-no kaj dume iĝas pli kaj pli stulta. Por pruvi, ke mia cerbo tamen restas funkcianta, mi solvis la logik-enigmon *Bellertaj Konkursoj*. Mi ŝatas tiajn!

Lucie Karesová, Ĉeĥio

La enigmon *Bellertaj Konkursoj* mi trovis ege interesa kaj alloga, tiom, ke ĝi cerbumigis min du tagojn. Dankon al s-ino Löwenstein pro la vere interesa kap-rompilo!

Alberto García Fumero, Kubo

# Lidja

Heinz Dieter Maas, Germanio



**Jen la dua kaj lasta parto de la biografio de Lidja Zamenhof. En tiu ĉi jaro la bahaanoj kaj esperantistoj memoras la 50-an datrevenon de ŝia tragika morto.**

En 1928, okaze de du bahaaj kunvenoj en la kadro de la UK de Antverpeno, Lidja faris unuafoje publikajn paroladojn, kio sufiĉe mirigis la esperantistojn, ĉar ĝis tiam ŝi neniam konsentis pri tio kaj estis konsiderata kiel timema kaj retirigema persono. La cetera Zamenhofa familio neniel kontraŭis la konvertiĝon de Lidja al la bahaaj kredo, sed ili ankaŭ ne komprenis. En 1929 Lidja eĉ publikigis artikolon pri la bahaaj religio en pollingva juda gazeto, kio ŝokis la familion kaj multe pli la judan komunumon. Tiutempe Lidja komencis traduki en Esperanton *Bahá'u'lláh kaj la nova epoko*, ĉe kio Martha Root kunhelpis. En 1930 Lidja vojaĝis al Hajfo, en Palestino, sankta loko por bahaanoj, kaj renkontis Shoghi Effendi, la tiaman gvidanton de la bahaaj kredo.

Lidja decidis lerni la Cseh-metodon por instrui Esperanton eksterlande. La movado tamen ne plu estis tiel favora al ŝi kiel antaŭe, ĉar oni ja malŝatis, ke membro de la Zamenhofa familio aktivas por la disvastigo de la bahaaj aferoj, timante ke la publiko ekkredus, ke Esperantismo estas intime ligita al iu religia kredo.

En 1932 Lidja multe prelegis kaj instruis, foje antaŭ 120 homoj, en Svedujo. Post tio ŝi ricevis inviton de la Esperanto-Klubo de Lyon, Francujo, por tie gvidi rektmetodajn kursojn. Kaj per tio komenciĝis la kariero de Lidja kiel Cseh-instruistino.

Kvankam la instruado de Esperanto en publikaj lernejoj estis malpermesita en tiama Francujo, la intereso pri Esperanto estis grandega. Lidja instruis al klasoj kun centoj da personoj, la gazetaro favore raportis kaj la lernantoj estis entuziasmaj. Tiuj sukcesoj ripetiĝis en pluraj aliaj francaj regionoj. Poste Lidja vizitis Nederlandon, sed unuafoje ne partoprenis la Universalan Kongreson en 1933, kiu okazis en Kolonjo (Germanujo) sub rego de la nazia influo. Sur fotoj de tiu hontinda kongreso, kies organizon la Esperanta gazetaro aparte laŭdis, oni vidas ĉie la naziajn emblemojn kaj la germanajn esperantistojn levantajn la brakon por "germana saluto".

Lidja daŭrigis sian instruadon en Francujo ĝis somero 1934, kiam ŝi reiris Varsovion post dujara foresto. Ŝi partoprenis la Stokholman UK kaj rekomencis sian Esperanto-instruadon en Francujo. Lidja estis tiel sukcesa, ke laborante nur por Esperanto, ŝi povis vivteni sin dum pluraj jaroj.

La grandegaj sukcesoj de Lidja fine atingis interesiĝantajn esperantistajn rondojn en Usono, kiuj invitis ŝin doni Cseh-lecionojn tie. Sed unue Lidja revojaĝis en printempo 1937 al Francujo por novaj kursoj. En aŭgusto ŝi partoprenis la Universalan Kongreson de Vieno, kie prelege ŝi emfazis la gravegan rolon de la patrinoj en la kontraŭ-milita edukado de siaj gefiloj. De Vieno ŝi revojaĝis al Varsovio, kie la situacio por judoj pli kaj pli akriĝis.

En septembro 1937 Lidja enŝipiĝis por Usono, kie oni atendis ŝin kun miksitaj sentoj, ĉar disvastiĝis la onidiro, ke ŝi estas mizera preleganto. Krom tio, esperantistoj kaj bahaanoj devis kunlabore organizi ŝian vojaĝon kaj restadon. Ambaŭ grupoj estis ĵaluzaj pri Lidja, kaj la esperantistoj ne fidis la bahaanojn, kiuj ja parolis pri la neceso de universala lingvo sed apenaŭ interesiĝis pri Esperanto. Tio sanĝiĝis, kiam Lidja eklaboris en Usono, sed la sukcesoj ne estis tiel triumfaj kiel en Francujo. Por Lidja Usono estis tre fremda, surpriza mondo; ŝi ne bonfartis kaj estis malfeliĉa tie.

En 1938 la politika situacio fariĝis pli kaj pli kriza kaj la pola registaro dekretis, ke polaj ŝtatanoj, kiuj ne revenos hejmen, perdos sian ŝtatanecon. Samtempe la restadpermeso de Lidja malvalidiĝis kaj montriĝis, ke pro nescio, ŝi malobeis usonan leĝon, kiu malpermesas perlabori monon, eĉ se malmulte, dum la restado. Ĉial Lidja forlasis Usonon fine de novembro 1938.

Reveninte hejmen ŝi sin dediĉis denove al tradukado kaj verkado. Interalie ŝi tradukis *Bahá'u'lláh kaj la nova epoko* en la polan lingvon. Tiutempe ekzistis precize tri bahaanoj en Pollando, kaj ĉar ili apartenis al tri malsamaj naciecoj, ili interkomunikiĝis nur en Esperanto.

En septembro 1939 eksplodis la milito kaj Lidja havis la saman sorton kiel ĉiuj polaj judoj. Ŝi devis vivi en la varsovia getto, kie ŝi donis lecionojn pri la angla lingvo por vivteni sin. La esperantistoj, kiuj ne forgesis Lidjan, sendadis pakojn al ŝi. Germana soldato, mem esperantisto, klopodis helpi Lidjan ebligante fuĝon, sed ŝi rifuzis.

En 1942 nazioj komencis grandskalan ekstermadon de judoj en Varsovio, kaj en aprilo 1943 la varsovia getto estis definitive "likvidita". Supozeble tiam ankaŭ Lidja estis deportita al la koncentrejo Treblinka kaj tie mortigita, kiel pli ol miliono da samsortanoj.

Lidja luktis por la unueco de la homaro, la interfratiĝo de la homoj kaj la emancipiĝo de la virinoj. Ĉio ĉi radikis en la homarismo proklamita de ŝia patro kaj en la instruoj de la bahaaj kredo. Ŝi apartenas al la granda armeo de pacaj batalantoj, kiuj foroferis sian vivon en la lukto por pli luma estonteco. Lidja Zamenhof, kamemora al esperantistoj kaj bahaanoj, restos neforgesita.

*Lidja Zamenhof, kor' fervora  
Vartante patran sent-heredon,  
Jen, serĉas sorĉan sav-rimedon  
Por mond' amara kaj dolora.*

*Kaj kun entuziasmo kora  
Servadas la Bahaan kredon,  
Lidja Zamenhof, kor' fervora,  
Vartante patran sent-heredon.*

*El sent' profunda, pens' valora  
En sino havas riĉan bedon.*

*El ili plektas flor-bukedon:  
Novelojn kun enhav' trezora,  
Lidja Zamenhof, kor' fervora.*

(Kálmán Kalocsay, 1931)